

ÖSTERREICHISCHE  
NATIONALBIBLIOTHEK

340.691 - B.Esp

TEOZOFIO  
KAJ  
ĜIA  
DOKTRINO



ELDONIS TEOZOFIA ESPERANTA LIGO.

340.691 - B.Esp

# Teozofio kaj Ĝia doktrino.

## Kio estas Teozofio?

„Teozofio“ laŭvorte tradukita, signifas „Dian saĝecon“. Ĝi entenas ĉion. Ĝi ne povas esti nomata religio, scienco aŭ filozofio ĉar ĝi entenas ĉion, kaj estas sintezo de ĉiuj religioj, filozofioj, artoj, kaj sciencaj sistemoj. Teozofio havas en sia sino lokon por ĉiuj homoj kiuj celas al unuiĝo kaj frateco.

## Tri ĉefaj celoj de Teozofio.

- 1.) Formi kernon de universala frateco inter la homoj, sen ia distingo pri nacio, kredo, aŭ kasto.
- 2.) Instigi al kompara studado de religioj, filozofioj kaj sciencoj.
- 3.) Esplori la neklarigitajn leĝojn de la naturo kaj latentajn kapablojn de la homo.

Por fariĝi membro de teozofia societo oni estas devigata akcepti sole la unuan celon de teozofia societo.

La aliaj du celoj ne estas devigaj kaj ne ĉiuj membroj okupiĝas pri ili. Tamen ili alportas grandan profiton al tiu, kiu sin dediĉas al ili.

## Teozofia doktrino.

Teozofia societo ne havas dogmojn, sed ĝi havas kelkajn tre utilajn instruojn, kies studado donas al la membroj grandan scion pri la vivproblemoj kaj redonas al ili internan pacon.

## Divido de la kosmo.

Oni dividas la kosmon aŭ la naturon en sep mondojn laŭ la denseco. Ĉiu mondo havas sian propran materian substancon de diversaj gradoj de denseco. Tiuj mondoj aŭ niveloj (regionoj) respondas al la sep principoj de la homo.

- 1.) La fizika mondo (tero), kiu respondas al la fizika korpo de la homo, ostoj-tero, sango-akvo, aero-gaso. Tiun fizikan korpon oni evoluas per ekzercado, pura nutraĵo (vegetaĵa), gimnastiko, sporto, spirado kaj ripozo.
- 2.) La etera mondo kun kvar gradoj de diversa denseco, kiu respondas al etera korpo de la homo. La plej maldensa etera materio proksimiĝas al la plej densa materio de la astrala mondo. Ĝi evoluas per ripetado de agoj.
- 3.) La astrala aŭ psika mondo. Tiu ĉi ankaŭ dividiĝas en sep diversajn statojn aŭ denseco-gradajn. El ĝia materio konsistas la astrala (dezira aŭ senta) korpo de la homo. La Astrala materio estas la portanto de la vivo (ĝiva) kiu ĉion vivigas. Oni ĝin disvolvas per la sentoj, kiuj ne celas la egoisman ĝuadon.
- 4.) La mentala mondo. Tiu ĉi mondo estas dividata en du partojn. Mentala malpli alta aŭ „rupa“ kaj la mentala pli alta aŭ „arupa“. La mentala malpli alta aŭ „rupa“ mondo havas kvar gradojn de denseco. Ĝi respondas al konkreta penso-mondo aŭ intelekta korpo de la homo. Oni evoluigas ĝin per observado, pripensado, rezonado kaj memoro.
- 5.) La mentala pli alta aŭ „arupa“ mondo. Ĝi estas ankaŭ nomata kaŭzala mondo kaj inter-respondas al la abstrakta penso-mondo aŭ penso-principo en la homo. Ĝi estas dividata en tri gradojn. En tiu ĉi mondo registriĝas ĉiuj kaŭzoj, kiuj restas en la materio stampitaj kiel en universala matrico. Ĉe la homo oni disvolvas tiun korpon per altaj, noblaj, puraj kaj neegoistaj pensoj.
- 6.) La spirituala aŭ „Buddhi“-mondo, inter-respondas al la intuicia principo en la homo. Ĝi estas korpo de unuiĝo, en kiu oni sentas sin parto de ĉiuj estaĵoj.

7.) La pura spirito aŭ „Atma“, kiu respondas al la plej alta principo en la homo.

Pri tiuj ĉi du lastaj oni scias nur malmulte, ĉar ilia gloro kaj majesteco superas nian komprenon. Oni nomas ĝin ankaŭ „Nirvana“.

Por la ordinara homo en normala stato estas nur videbla la fizika mondo. Ekzistas kelkaj nenormalaj kapabloj disvolvitaj ĉe diversaj medioj, sed tiuj kapablas vidi nur la eteran mondon, kaj parton de la astrala mondo, ĉar pli alten ili kutime ne povas penetri. Tamen ankaŭ la ceteraj mondoj povas esti vidataj de homoj, kiuj sin ekzercis speciale por tiu ĉi celo kaj evoluigis en si la kapablojn de perceptado de pli subtilaj vibraĵoj. En la malproksima estonteco, post multaj jarmiloj, tiuj ĉi kapabloj fariĝos ĝeneralaj, jam ennaskitaj posedaĵoj de ĉiuj homoj. Nuntempe nur malmultaj kuraĝuloj povas tiujn ĉi kapablojn en si disvolvi, ĉar tio postulas multjaran paciencon ekzercadon, kaj precipe la plenan sinregadon.

### La tri ĉefaj veraĵoj.

- 1.) La homa animo estas senmorta kaj ĝia estonto estas estonto de io, kies kreskado kaj majesteco estas senlimaj.
- 2.) La principo vivdonanta estas en ni kaj ekster ni; ĝi estas nepasema kaj eterne bonfaranta, ĝi estas ne aŭdata, nek vidata, nek sentata, sed ĝin perceptas tiu, kiu percepti deziras.
- 3.) Ĉiu homo estas sia propra, absoluta leĝdonanto, al si mem la donacinto de feliĉo aŭ ĉagreno, la arbitracianto (determinanto) pri sia vivo, sia rekompenco kaj sia puno.

### La leĝo de unueco.

Teozofia doktrino diras, ke ĉiuj estaĵoj devenas el unu kaj sama fonto. La plej malgrandan atomon kaj elektronon trafluas la sama Dia Vivo, kiel la plej grandan kosman sunon. Niaj korpoj konsistas el la samaj ĥemiaj elementoj, la samaj sentoj, emocioj kaj pasioj nin skuas,

la sama intelekta lumo malfermas la ni la vojon al la scio. La neesplorebla Amo regas la evolucion de ĉiuj estaĵoj. La nekonata Kreinto loĝas en la koro de ĉiuj estaĵoj, kaj montras sin, vestita per la belaĵoj en la ekstera mondo, kaj serĉas sian perfektecon en ĉiuj estaĵoj. El tiu vidpunkto ni vidas klare la fratecon de ĉiuj homoj.

### La leĝo de Karma,

aŭ „Kion vi semos, tion vi rikoltos.“

Karma estas leĝo de kaŭzo kaj efiko. Ĝi adaptas kaj harmoniigas ĉion en la mondo. Ĝi egaligus ĉiujn mankojn kaj harmoniigas la agadon. Ĝi zorgas ke ĉiuj moralaj, spiritualaj, kaj materiaj ŝuldoj estu plene pagataj kaj tial oni ĝin nomas ankaŭ „leĝo de justeco“. Ĝi estas severa kaj justa juĝisto kaj gvidisto de la mondharmonio. Ĝi ekvilibrigas la tutan mondagadon kaj neniu povas kaŝiĝi antaŭ ĝi, ĉar ĝi trapenatras ĉion. La tempo forpasas, la homoj mortas, sed ĝi ĉiam ekzistas kiel enregistraĵo de la ŝuldoj, kiel gardanto de la harmonio kaj la mondevilibrado. Ĝi estas la gvidanto de la homo kaj akompanas lin tra ĉiuj mondoj dum la vivo kaj same post la morto de lia fizika korpo. Ĝi gvidas lin en novan korpon ĉe lia renaskiĝo en tiun ĉi mondon, trovante por li la plej taŭgan familion kaj korpon, kiun li meritas laŭ sia progreso en la pasinteco. Liaj bonaj agoj aperas sur lia vojo kiel helpiloj por lia pli rapida progreso, kaj liaj malbonaj agoj staras kiel baraĵo kaj malhelpaĵo, retenante lin kaj nubigante lian vojon al dia progreso. Tamen tiuj malhepaĵoj estas neniam tiel grandaj, ke ili superus liajn fortojn, kaj se li estas persistema en sia aspirado al la dieco, ĉiuj malhepaĵoj estas venkataj kaj malaperas kiel nebulo sub la influo de la suno, kaj refoje la eterna pilgrimanto povas vidi la sunon, kiu simboligas al li la dian spiriton.

Neniam la homo iras malantaŭen en sia progreso. Li povas nur halti, estante retenata de sia egoismo, sed la leĝo de progreso puŝas lin antaŭen al la glora celo.

La homa animo kolektas spertojn sur tiu ĉi tero kaj en aliaj mondoj, sed por tio ne sufiĉas unu sola vivo sur tiu ĉi tero kaj tial ĝi submetiĝas al la leĝo de

## Rĕenkarniĝo aŭ renaskiĝo.

„Nenio mortas, ĉio renaskiĝas.“

En aŭtuno defalas la folioj de la arboj, forvelkas la floroj, kaj la kreskaĵoj kaj la vivo retiriĝas internen, kaj oni diras ke la naturo dormas. Kiam la printempo venas kaj la sunradioj ekkaresas per sia varmeco la teron, tiam la interna vivo de la arboj kaj kreskaĵoj vekigĝas, kaj ornamigante per novaj folioj kaj verdaĵoj, ĝi ridetas renkonten al la suno kaj al la refreŝigantaj gutoj de la pluvo. La delikataj korpetoj tremetas de ĝojo kaj per la odoro laŭdas la Kreinton.

Kaj la homo? Li ankaŭ renaskiĝas. Post kiam venis lia aŭtuno kaj lia korpo eluziĝis kaj kadukiĝis kaj li ne trovas plu la eblon agadi libere en sia korpo, lia interna volo komencas senti deziron de liberiĝo kaj ĉesas sin interesi pri la korpo, kiu similas al rustiĝinta kaj eluzita maŝino. Kaj post pli aŭ malpli longa tempo, li forlasas la ligojn de la korpo kaj retiriĝas en pli maldensajn kaj pli spiritajn regionojn aŭ mondojn. Se tiu mortado okazas normale, oni preskaŭ ne rimarkas la dolorojn ĉe la agonianto. Tamen ofte venas la morto akompanata de doloroj, ĉar la volo de la korpo rezistas al la spirito, kiu deziras liberiĝi de ĝi. La korpo mem havas sian ennaskitan instinkton de sinkonservemo kaj sindefendo, kiun ni nomas la volo al vivo kaj ĉe la morto, sentante alproksimiĝon de sia perejo, ĝi serĉas ĉiujn rimedojn por plilongigi sian ekzistadon. La antaŭmorta sendolora stato venas, kiam la pli granda parto de la astrala (sento) korpo liberiĝis de la fizika korpo.

Post la plena liberiĝo el la materia korpo, la spirito (homo, animo) tre baldaŭ liberiĝas de la etera korpo, kiu disvolviĝas, iom post iom, en la proksimeco de la densa (fizika) korpo, kaj en specialaj cirkonstancoj ĝi estas eĉ videbla de homoj kun iom da sentemo kiel grizblanka nubeto super la tomboj. Iom post iom liberiĝas la spirito de la astrala korpo, kiu entenas en si la pasiojn kaj emociojn. Transformante ilin en pli altajn sentojn, ĝi leviĝas en la mentalan aŭ penso-mondon. Ĝis ĉi-tien akompanas lin la pensoj konkretaj, kiujn li ankaŭ transformas en pli spiritajn pensojn, kaj travivas tiel la ĉielan feliĉegon kaj pacon, kiun nenio povas ĝeni nek interrompi.

Sed tamen ankaŭ tiu ĉi feliĉego ne povas esti eterna eĉ se ĝi povas daŭri multajn jarcentojn — ĉar la meritoj kaj kaŭzoj akiritaj sur la tero havis siajn limojn. Se ni komparas ĝin kun la ŝparita mono, oni tamen scias, ke eĉ se ĝia sumo estas granda, ĝi iam elĉerpiĝos.

Tiam denove en la homo vekigatas la deziro vivi en la materia mondo kaj daŭrigi sian pilgrimandon. En tia momento malfermiĝas al li la plej alta vido kaj antaŭ liaj spiritaj okuloj aperas kaj preterpasas kiel grandioza panoramo liaj multegaj pasintaj vivoj kaj li mem juĝas sin, vidante la bonon kaj la malbonon, kiun li kaŭzis. Kaj kun la helpo de pli evoluintaj estaĵoj (Sinjoroj de Karmo) li formas al si la planon por sia nova vivo.

Li vidas siajn mankojn kaj erarojn, li vidas siajn ŝuldojn pagitajn kaj ankoraŭ pagotajn kaj destinas al si la ŝarĝon, kiun li portos en la nova vivo. La ŝarĝo respondas al liaj fortoj kaj kapabloj. Puŝata de la progresforto, kaj de la deziro helpi kaj esti helpata, li enprofundiĝas, iom post iom, en pli densan materion, kaj gvidata de la Karmo-leĝo, li elektas la gepatrojn, kiuj povus doni al li novan korpon, taŭgan por lia nova vivotasko. Tiam rekomenciĝas la doloriga pilgrimado. Ĉirkaŭante sin per pli densa materio, li fine iun tagon reaperas en la fizika mondo kiel malgranda senpova infaneto.

En la materia mondo li ĝenerale perdas la konscion pri sia dia deveno kaj pri sia senmorteco, ĉar li tro identiĝas kun la fizika korpo, opiniante, ke li estas la korpo mem.

Tamen en lia interno kaŝiĝas la sekreto de lia deveno. Kiam li tien enprofundiĝas li havas konscion, ke li estas super la materio kaj ke lia patrujo estas en alia mondo. Tiam li ekkomprenas multajn sekretojn de la vivo, kiujn lia materia okulo ne povas percepti.

Renaskiĝante ĉiam denove, li kolektas la spertojn kaj fine vekigatas en li la deziro liberiĝi de tiu ĉi ĉiama renaskiĝado kaj li soifas la ekonon de la vero. La homa vivo ne ŝajnas al li plu la plej alta evoluo-grado, kaj ĉar li konscias ke sub la homo staras aliaj pli malaltaj evoluo-gradoj kiel la grado de bestoj, plantoj kaj mineraloj, li logike konkludas, ke super la homo devas ekzisti ankoraŭ pli altaj evoluo-ŝtupoj. Li do serĉas tiujn, kiuj jam trapasis

sian evoluon en homa regno, kaj kiuj jam staras sur la sojlo de la dia mondo. Se li estas bona kaj sincere deziranta trovi la vojon, li tiam trovas tiujn, kiujn oni nomas

### La Majstroj de Saĝeco.

Tiuj ĉi antigis la plej altan gradon de la homa evoluo. Ili formas la grandan frataron aŭ „Grandan Blankan Loĝion“, kiu ĉiam staras preta por servi al la evoluo kaj progreso de la tuta kreitaĵaro. Tiu ĉi potenca hierarĥio reganta la mondevolucion kaj la progreson de la homaro, staras sub la regado de la Plej Potenca, Sennoma, Eterna, Patro de ĉio.

La Majstroj de saĝo estas membroj de tiu ĉi potenca hierarĥio. Ili estas la ponto inter homo kaj superhomo, ĉar ili memvole reenkarigiĝas kaj uzas fizikajn korpojn por ebligi kaj helpi al la homoj kiuj sincere la aspiras progreson kaj volas helpi al la progreso de la homaro. La Majstroj prenas sub sian gvidadon lernatojn aŭ „ĉela-ojn“ kaj instruas ilin tiel, ke ili fariĝu kapablaj kaj utilaj kunlaborantoj de la granda hierarĥio en la mondo, kaj ke ili iam fariĝu membroj de la „Blanka Loĝio.“

Kiu aspiras fariĝi disĉiplo de la Majstroj de Saĝo, tiu devas vivi puran, moralan vivon, havi sanan menson, klaran kaj ageman intelekton, puran koron, spiritualistan percepton de la vivado, fratan amon al ĉiuj estaĵoj, konstantan deziron helpi al la aliaj homoj, doni kaj akcepti konsilojn kaj instruojn, kuraĝe toleri la personajn ofendojn. Li devas sentime defendi la maljuste atakitajn, kaj senĉese celi al propra perfektigo kaj plena sinregado, kaj tute sin dediĉi al la servo de la homaro.





## TEOZOFIA ESPERANTA LIGO

T. E. L. estis fondita en la jaro 1911 kaj celas :

1. *Konigi Esperanton al Teozofoj.*
2. *Konigi Teozofion al Esperantistoj.*
3. *Uzadi Esperanton kiel internacian lingvon de la Teozofia Societo.*

La laboro de la membroj grupiĝas jene :

— Por Esperanto — ili aranĝas kursojn de Esp. o kaj paroladojn en la Loĝioj. Dissendadas propagandilojn, kiuj klarigas la idealistan kaj realistan vidpunktojn, la utilecon de Esperanto, ĝian progreson en la tuta mondo kaj ĝian historion. Verkas artikolojn kaj sendadas ilin al teozofiaj kaj orientstelaj gazetoj por aperigo.

— Por Teozofio — ili verkas kaj tradukas artikolojn pri nia filozofio, publikigas ilin en esp. o-gazetaro, aranĝas paroladojn pri Teozofio, eldonas teozofian revuon kaj librojn, kaj starigas teozofian vortaron :

— Uzas — Esperanton kiel internacian lingvon de T. S.-anoj. Trovas inter la diversnaciaj membroj subtenon por sia studado, kaj klopodas enkonduki Esp.on, pro ĝiaj preferoj, por ĉiuj internaciaj komunikoj kaj interrilatoj de T. S. Aranĝas dum la diversnaciaj kunvenoj kaj mondkongresoj de la T. S. kaj Orienta Stelo paroladojn kaj diskutojn de ĝenerala intereso.

La organo de la Ligo : **ESPERO TEOZOFIA** celas :

1. *doni al la membroj eblecon studi ĉefe la "Vojon", kiu kondukas al vera Teozofio.*
2. *Esti ligilo kaj propagandilo de la liga agado.*

Ligokotizo estas 1 sv. fr., sendota al internacia sekretario S—ino MARIE CIMROVÁ, PRAHA II., KRAKOVSKÁ 17.

# LUMO SUR LA VOJON KAJ KARMO

Mendebla ĉe la administracio de E. T. Prezo 5 Kĉ.

III., IV., V. VI. JARKOLEKTOJ DE  
„ESPERO TEOZOFIA“

estas haveblaj po . . . . . 12 Kĉ = 2 fr. sv.

Aliaj jarkolektoj estas tute elĉerpitaj.

## Teozofiaj-esperantaj libroj.

Fatala Ŝuldo, teozofia romano de Lionel' d' Alsace

(Trad. de s-ino Ferter-Cense) . . . 10'— fr.

La Kialo de la Vivo . . . . . 0'20 fr.

Mendeblaj ĉe la sekretario s-ro S. Frantz, Paris XVe, -21,  
Rue Alain Chartier. — Ĉe la mendoj aldonu ankaŭ,  
monon por poŝtelspezoj.

## › ESPERO TEOZOFIA ‹

ORGANO DE TEOZOFIA ESPERANTA LIGO.

Redakce kaj administracio:

PRAHA II., KRAKOVSKÁ 17., Ĉeĥoslovakio.

Aperas kvaronjare. Abonpago 4 sv. fr. sendota al  
la redakcio de E. T. Speciala aranĝo de abonprezo  
por kelkaj landoj.